# KOMITATO
# 19-a de januaro 2025

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min

Dimanĉon la 19-an de januaro 2025, de la 10a ĝis la 16a30 kunsidis, ĉeeste en Parizo kaj rete pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.

[ĉeestas: S = surloke en la kongresejo, R = rete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Andréa | BERTRAND | AB | Repr. de la membraro | | X | | |
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | | X | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Clément | GENTY | CG | Repr. de la membraro | | | X | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | S | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | | | X | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | S | | | |
| Christine | RAIFFAUD | CR | Repr. de la membraro | | X | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | | X | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | S | | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de fed. Limousin | S | | | |
| Claire | DIVOY | CD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | | | demisiis |
| Claude | Bensimon | LP | Repr. de fed. Bretagne | S | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | S | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | S | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Inès | KAHIN | IK | Repr. de JEFO | R | | | Lucile |

13 komitatanoj ĉeestas el 20 (3 rete). Lucile anstataŭas Inès.
4 senkulpiĝis, el kiuj 1 donis povon.
Estas kvorumo (½). 13 voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min

- Xavier prezidas
- Régis protokolas, helpe de Bruno, ĉar Claire demisiis de la estraro kaj de la komitato.

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj** 5 min

0.4 **Dato de la venonta kunsido + klarigo pri la komitatkunsidoj** 4 min

Okazos du retaj kunvenoj antaŭ la fizikaj kunvenoj de la nacia kongreso en Nantes:

- Lunde la 24an de marto de la 19a30 ĝis la 21a30
- Marde la 13an de majo de la 20a ĝis la 22a

# 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1 Malfacilaĵoj de la estraro — DISKUTO 20 min

Nia sekretario Claire demisiis, ni do bezonas helpon de aliaj komitatanoj por la sekretariaj taskoj

Necesus havi duopojn por ĉiuj postenoj de la estraro por sin apogi. Claire suferis de tiu manko samtempe kun manko de disponebleco. Simile Régis solecas en sia laboro kiel kasisto. Dum la antaŭa jaro Paul laboris kun li duope.
Du aferoj malfaciligas niajn taskojn: la kotizsistemo kiu postulas pli da laboro kaj la eblecoj por aliĝi kiuj multobliĝis.
Marcelle proponas helpi por la taskoj rilate al sekretario, tamen ŝi ne povos samtempe daŭre prizorgi la taskojn pri la volontula servo. Emmanuelle certe pretos helpi ŝin. Xavier povas ankaŭ fari parton de la sekretaria laboro.
Xavier sendos mesaĝon al la lokaj asocioj kiuj estas en la komuna kotizsistemo por scii ĉu iu interesiĝas pri la volontula servo. Estos ankaŭ okazo serĉi helpon pri diversaj taskoj ekzemple per organizo de kunveno kiu invitas ĉiujn kasistojn de niaj partneraj asocioj. Same pri sekretariaj taskoj ktp.

### 1.2 Kunlaboro inter la estraro kaj la komitato — DISKUTO 10 min

- Daŭrigo de retaj komitataj kunsidoj inter la kutimaj ĉeestaj kunsidoj por fariĝi laborgrupoj
  Ni okazigos du kunvenojn antaŭ la nacia kongreso kaj pliajn laborkunvenojn en kiuj ni invitos la partnerajn asociojn.

### 1.3 Stato de la aliĝoj por 2024/2025 — INFORMO 5 min

420 la 17a de januaro < 507 je sama dato lastan jaron, pro iom da malfruo en la relanĉa laboro.
Ni sendos paperan aliĝilon al la eksaj anoj por instigi ilin denove aliĝi.

### 1.4 Volontula servo — DISKUTO 10 min

Esploro de nia reto de asocioj por vidi ĉu estas intereso, MDB daŭre interesiĝas pri la temo, kun la kompetenteco de Tuluzo.

### 1.5 Financa stato — INFORMO 10 min

Prezento de la financa bilanco 2023-2024 de Régis Fabre. Finpretos en marto ĉar nun mankas detala valoro de la stoko. Régis Fabre prezentis la plej venditajn varojn lastjare.

- **Manĝopaŭzo ĝis la 14a -**

### 1.6 Funkciado de nia asocio / Administraj taskoj — DISKUTO 40 min

# 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Kio nova pri informado? — DISKUTO 30 min

retejo, sociaj retoj, redakto de komunikoj kaj dissendo…

Lucile proponas krei gvidilon pri sociaj retoj kaj diversaj iniciatoj kial “verda sago” kaj krei ligon inter individuaj ideoj kaj asocioj kiel Espéranto-France. Subteno de UFE helpus. Ni organizu kunsidon pri tio invitante Emmanuelle Richard kiu estas nuntempe la plej aktiva pri tio en la asocio (eldonoj, retejo).

# 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 ***Le Monde de l'Espéranto*** **INFORMO** 10 min

Rezulto de la sabata kunveno :

- Krei redakcian komitaton
- Eldoni la revuon unufoje jare kiel montrofenestro al la ekstera publiko (antaŭ septembro)
- Peti al Céline Bernard kiu nun redaktas kaj aperigas Espéranto-Infos 4-foje jare ĉu ŝi konsentus ĉefredakti LME kun kompenso financa.
- Proponi aperigon de regulaj lokaj informoj de la membroj / kluboj de Francio en Espéranto-Infos
- Peri abonon al Espéranto-Infos
- Emmanuelle Richard pretus daŭre enpaĝigi la revuon LME.
- BF diskutis telefone kun Céline kiu bonvenigis la ideon sed bezonas precizigojn. BF ekpreparis priskribon de la tasko kaj cirkuligos en la komitato antaŭ sendi al ŝi.

***Esperanto Aktiv'*** **INFORMO** 10 min

Rezulto de la sabata kunveno :

- Pierre Dieumegard, Raymonde Coquisard kaj Emmanuelle Richard solvos la teknikan problemon por refunkciigi la aperon de la retletero

3.2 **Aliaj eldonaj projektoj** **INFORMO** 5 min

Vidi mesaĝon de Emmanuelle kiun resendos XG.

3.3 **Kongreso 2025** **DISKUTO** 20 min

- informado kaj aliĝo

  La aliĝiloj estos pretaj fine de januaro. Esperanto France varbos kiel kutime
- helpantoj LKK
- tarifoj

  La kotizoj estos la samaj ol tiuj dum la nacia kongreso en Liono.
- retejo

  La retejo finpretos dulingve morgaŭ. (https://kongreso2025.esperanto-france.org)
- logotipo

Jefo varbos pri la kongreso, tamen ili pli fokusas pri Festo kiu okazos aŭguste.

3.4 **Kongreso 2026** **DISKUTO** 10 min

Ĉu konfirmo de la intereso de Tuluzo ?

Anonco de la ideo ne vekis fortan malaprobon. Sed daŭre diskutindas kaj eksplorindas okaze de venontaj kunsidoj lokaj. Xavier sendis la samajn ĝeneralajn informojn pri kongresoj kiel por Nantes.

3.5 **Universala Kongreso 2025 en Ĉeĥio** **DISKUTO** 10 min

58 francaj partoprenintoj, ĉu iu dezirus organizi komunikadon inter ili kaj eventualaj pliaj partoprenantoj? *(ne traktita)*

3.6 **Reprezentanto de UFE en la komitato de UEA**

Kandidatiĝo de Aleks Kadar por iĝi komitatano A de UEA por Espéranto-France (elektita de la asocio).
Nun estas Michael-Boris Mandirola kiu estas komitatano A por Espéranto-France. Li pretas pluesti sed pretas rezigni se iu alia motivigita homo sinproponas.
Reprezentantoj sinanoncu antaŭ la 31an de majo al UEA.
François Lo Jacomo, laŭdire, estus kandidato por iĝi komitatano B (elektita de la membroj).

Propono de Aleks unuanime akceptita por la nova mandato.

3.7 **Peto de subvencio por apogi muzikan projekton** **DISKUTO** 10 min

Peto de Vinilkosmo al UFE iĝi kunproduktisto por subteno al eldonprojekto de albumo de Chris Freddy (el DR Kongo) en espéranto : 750€

Aleks Kadar pretas donaci samtempe 250€ por la kaso Afriko de Espéranto-France.
Demandoj estas kio estas la kompenso por la kunproduktado ? Ĉu ricevo de senpagaj kodoj se presotaj ? Apero de logobildo de UFE ? Ĉu la albumo estos vendata ? Se pagota al vinilkomso necesos fakturo, aŭ subvencio al Eurokka.

Propono akceptita kun 1 sindeteno.

### 3.8 Aliaj informoj - federacioj — INFORMO 5 min

La nova federacio Okcitanio eble aliĝos al Espéranto-France laŭ MBM

### 3.9 Projekto Péraire kaj arkivoj — INFORMO 5 min

1) Pascal Dubourg-Glatigny proponas deponi novan subvencipeton por daŭrigi la projekton pri protekto de la arkivoj de UFE kaj membroj. Tio estus ankaŭ iom enspeziga por UFE.

2) Origanala verkmaterialo de Peraire estis retrovita en Greziljono, ĉirk. 400 paĝoj, malpli bona kvalita kopio estis jam skanita por la Peraire-retejo sed indus do skani la originalon. Diskutinda kun Régis kaj Pascal DG

3) Régis Fournier suggestis ke eldonindas parto de la Peraire dokumentoj ĉ 800 paĝoj, ĉu papere, ĉu rete?. Temo diskutenda en la eldona komisiono kaj kun la esploristoj.

La produktistaj firmaoj kiuj proponas realigi elsendaĵon pri Péraire vojaĝoj daŭre rilatas kun televidkanaloj, sed la nuna financa situacio por publikaj kanaloj (France TV, Arte) ne faciligas la negocadon. Tamen, la projekto levis ilian intereson.

Pri la kolekto de arkivoj, Claire Mousset-Declas nun ne plu povas stoki kromajn materialojn ĉar jam stokis grandan kvanton de libroj kaj dokumentoj. Necesas pluekplori kie translokigi tiun stokon, eventuale en Greziljono.

### 3.10 Rilatoj kun SAT-Amikaro — INFORMO 5 min

Lasta komuna kongreso okazis en Sète en 2011.
Ĉi-jare la kongreso de SAT-Amikaro okazos samtempe kaj samloke kiel la regiona staĝo de Esperanto-France-Est kaj Bavelo en Vigy (57) proksime de Thionville.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

### 4.1 Metodo 12 — INFORMO 5 min

Nova versio estas planata por aperigo ĉi-somere.
Xavier petis prezproponojn de Robin Guinin por la bildoj (2 eblecoj).
Ni elektis havi bildojn de Robin por la ĉefaj lecionoj kaj uzi fotojn senpagajn por la kromaj lecionoj. Tiel kostos malpli kaj eblos realigi la laboron pli rapide por ke estu preta por la somero.
Enpaĝigado estas zorgata de Emmanuelle.
Akademianoj kontrolas la lingvaĵon.
PG demandas pri reeldono de Metodo 11 kun bezono de plibonigoj por forigi "eksmodaĵojn".

### 4.2 MLA — DISKUTO 10 min

Materialo eldonita de UFE en 2022. Preskaŭ elĉerpiĝis. Tiu projekto aspektis grava pro la oficiala financa helpo de Eŭropa Unio, kaj ni esperis uzi tion por montri ĝian seriozecon al instruistoj kaj allogi ilin, sed evidentiĝas ke ni ne sukcesis atingi la instruistojn. Nur esperantistaj instruistoj uzas la materialon kiu aspektas malpli bonkvalitaj ol aliaj materialoj por iuj.

### 4.3 Retaj kursoj de Esperanto-France — INFORMO 5 min

Ekzemplo de bona funkcianta servo de UFE kun dekoj da instruistoj kiuj instruas al centoj da lernantoj.
Tio memorigas al ni ke ni devas danki la bonvolemulojn koncernitajn kaj ankaŭ pridemandi ilin ĉu ili ŝatus helpi pri aliaj taskoj.